2-a Jaro, N-o 42 (94) APERAS S.A.T. SEMAJNE 15. Julio 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redakcio: 14, avenue de Corbéra Paris XII	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris XX	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

Katolika taktiko ĉe hispana regiono de Katalunio

Kun ekzemplo pri la neŭtrala Esp.-movado. Averto al katalunaj laboristoj esperantistaj!

La legado de la modela artikolo "La Sankta Ĵaŭdo" de k-do Ramón Durán decidigas nin, skribi ĉi-komplementajn skribaĵojn, por pli konfirmi kaj atesti lian aserton.

En Katalunio estas tre forta sento nacicma pro la hispana tiraneco. Ĉiam ekzistis ĉi-citita emo, sed nun pro la milita regado de Primo de Rivera kaj siaj sammetiuloj ĝi akriĝis je nekalkulebla grado. La tuta gejunularo nun estas nacikleri-kala, boksema kaj piedpilkludema, ĉefe en la urboj kaj gravaj vilaĝoj. Ankaŭ la klasika kaj karakteriza balo kataluna, nome la "*sardana*", reviviĝas tre multe. Ĵurnaloj, bultenoj, anoncoj k. a., kvindekobliĝis, katalune skribitaj. La mortintaj moroj kaj kutimoj renaskiĝas.

Sed, ĉu vi scias, kiu plej kontribuas al tio? — katolika pastraro. Kompreneble, dank' al la ne tolerema reĝimo militista. Ĉar la pastroj perdadis ĉian influon super la masoj, nun ili ĝin reakiras, profitante la politikan fluon. Kaj — oni povas vidi en Katalunio, ke pastraro dividiĝis je du frakcioj: hispanamantoj kaj katalunamantoj. La unuaj preskaŭ estas nevideblaj, tamen la aliaj ĉie estas troveblaj. Sennombrajn gazetojn kaj bultenojn, katalune, ili direktas kaj kunlaboras. En tiuj gazetoj oni skribas pri ĉiaspecaj sportoj, ĉefaj festoj de vilaĝoj kaj vilaĝetoj, artikoloj pri la "patrieco de dio" ktp. En la preĝejoj oni faras "grandajn diolaŭdojn" aŭ "sanktlaŭdojn", oni parolaĉas kontraŭ renovigaj ideoj, sed ĉio ĝenerale en kataluna lingvo. Antaŭe pastroj ne miksiĝis aktive antaŭ popolokuloj en la politikajn aferojn. Ĉar ekleziuloj estas favoraj nun al "sankta kaŭzo" de Katalunio, ili fariĝas ĉiam pli popularaj. La registaro hispana severe punis iujn ekleziulojn pro politiko kaj dank' al tio ankaŭ ili fariĝis kvazaŭ martiroj. Tamen alta pastraro estas kontraŭ tiu movado; sed ni kredas, ke tiu *saniga* influo super la amasoj estas treege aprobita de altranguloj ekleziaj. Per la revuoj, la preĝejoj, la lernejoj, konfesejoj, monakoj, monakinoj kaj pastroj, sukcesas penetri mezen de junularo malsprita. Ankaŭ, mi forgesis, estas nekalkulebla nombro da asocioj konfesiaj (religiaj), kie sidas grandaro da virinoj, viroj kaj infanoj, klientoj de katolikismo. Ĉiam ekleziuloj penas anigi ĉefe gejunulojn, infanojn, virinojn kaj riĉajn personojn.

Katolikoj vidis, ke la sola decidiga vojo por konkiri aŭ konservi la katalunojn estis politiko, kaj ili senhonte enmiksiĝas.

Ni prezentos faktojn al la Esperantistaro, kiuj taŭgos por kompreni, kio okazas en ĉiuj aliaj sferoj de la homa vivo, montrantaj tiujn faktojn, la taktikon ruzegan, jezuitan, kiun ili konstante uzas por siaj negocoj kaj por burĝa klaso, dank' al kiu ili vivas senlabore kaj trankvile . . .

*

En kataluna regiono ekzistas federacio esperantista, kiu eldonas revueton kaj sukcesis nun eldoni iun libron poezian, kiu laboriston nun ne povas interesi. Mi ne dubas pri ĝia altvalora literatura ŝtupo por . . . neŭtraluloj. Tiu federacio estas de multaj jaroj direktata de ekleziuloj. Eniris en ĝin sufiĉaj pastroj kaj multaj *lernantoj*. Kaj ilia influo estas nuntempe grava. Ĝi distingiĝas nun pro klerikala naciemo. Multaj el la membroj restas Esp-istoj nur por kontraŭstari hispanojn, ĉar ili uzas nian gepatran lingvon, katalunan; sed se iu bezonas rilati kun ni el Hispanio, tion ili faras per Esperanto aŭ katalune. Nur pro furioza katoliknaciismo, kiu neniel povas esti akceptata de serioza laboristo klasbatalanta. Dum ĉiuj okazintaj kongresoj oni faras mesojn, kien iras ĉiuj kongresanoj poste. Oni faras religiajn paroladojn; oni benas kongresanojn, kaj tio vere naŭzas, indignas konsciulojn. Vi vidos, tamen, en tiuj kongresoj homojn, kiuj sin nomas progresemaj, akceptante ĉion flanke de eklezio. Ĉiu povas aniĝi al citita federacio; *ĝi estas neŭtrala,* sed ĝi restas tia, nur por la propagando de katolikoj. Ĉu tiuj, kiuj tiom pompe sin nomas neŭtraluloj, eĉ socialistemaj, permesus, en la kongresoj komunistan, sindikalistan aŭ anarkistan propagandon? Ne, ili ruĝiĝus. Ili estas tre falsaj. Ili nur pretendas influi nesingardemulojn. Ilia neŭtraleco estas nevidebla, kaj tamen ili ĝin propagandas. Kiaj paradoksoj! Sub tiu masko ili kondukas Esperantismon al preĝejoj, al burĝaro, pere de la kongresoj kaj la revueto. Al sinceraj laboristoj, kiuj al ĝi apartenas, ni diras: Foriru el tiu naŭza kaj abomena medio, kiu nur celas nebuligi vian klaskonscion. Ili, la agitantoj, sin vestas per ĉiuj vestoj, sub ĉiuj imageblaj *facetoj*. Al ili estas tute same sin bapti al unu kiel socialisto, al alia kiel naciisto, al tria kiel katoliko, al kvara kiel burĝo . . . kaj poste la agado ilia estas kontraŭa al malfeliĉaj laboristoj, forpelante la plej indan parton de Esp-o. La pastroj, kompreneble laŭdegas katalune kaj esperante ĉiujn aniĝintojn, konsiderante ilin kiel filojn de siaj

koroj okaze de religia prediko aŭ vizito al iu sanktulino sur monto ĉe kapeleto por denove paroli al siaj amataj filoj . . . kaj ĉiuj restas kontentegaj pri ĉi-fanfaronaj kaj jugaj elmontroj. Tiel estas videble, ke lingvo estas bona instrumento por iliaj hipokritegaj celoj, por atingi deziratan. Malfermu vian menson, laboristoj, aniĝu al SAT, kreu SAT-grupojn, organizaĵon laboristan, klasbatalan, socialistan! Eliru el tiuj spiritputrigantaj flankoj, kiuj neniigas vin kaj vian klason! Ne brake iru kun tiuj, kiuj deklaras, ke pro naciistaj kaj patriotaj sentoj — ĉefe klerikalaj kaj burĝecaj — ili neniel povas rilati kun Esp-istoj el la aliaj provincoj hispanaj.

Proceso de laborgrupanoj

Dum monato Majo komencis en milita juĝejo de Litovio grava proceso. Sur seĝoj de kulpuloj eksidis 92 personoj, plejparte simplaj laboristoj. Inter ili troviĝis personoj (ekz. k-doj Dr. Domaŝevičius, Verbyla), kiuj jam dum cara regado batalis kontraŭ cara reĝimo, alcelante politikan kaj kulturan sendependon de Litovio. Nun "la kara patrio" akuzis ilin. Pro kio? Pro gravega krimo. Dum elektoj de I. kaj II. litova parlamento ili, simplaj laboristoj, ekkuraĝis starigi siajn kandidatgrupojn, t. n. laborgrupojn. Ĉar ili restis en malplimulto, do la politika polico eklaboris kaj ekestiĝis arestoj kaj turmentoj en la tuta lando. Baldaŭ ĉio trankviliĝis kaj jen post 3 jaroj alvenis juĝa tago. La 92 estis kulpigataj pro komunismo.

La interesa proceso allogis multnombran publikon. Proceso daŭris kelkajn semajnojn. Pli gravaj gazetoj detale raportis ĉiutage pri la juĝado. Atestantoj estis agentoj de politika polico. Tiuj ĉi politikaj analfabetuloj, homoj sen konscienco, elektitaj el sferoj de degeneratoj prenis volon akuzi la laboristan movadon, kiel kontraŭŝtatan. Ili ĉiuj fiaskis kontraŭ demandoj de advokatoj. Ekzemple unu advokato legis kelkajn frazojn el socialdemokrata programo kaj demandis, ĉu tiuj estas kontraŭŝtataj vortoj — la atestanto firme jesis tion. El paroladoj de akuzitoj evidentiĝis multaj faktoj pri besta traktado de la polico kun arestitoj. Vane prokuroro penis defendi la politikan policon kaj nei la terurajn faktojn; sian defendon li motivis per tio, ke ankaŭ policanoj estas "filoj de Litovio" kaj ili ne povis turmenti la "fratojn litovajn". — Naivulo!

La 10. Junio finiĝis la proceso — ĉiuj laborgrupanoj estas senkulpigitaj. Kial? Do, pasintjare la sama juĝo kondamnis al morto unu komuniston. Ho! Novaj sentoj blovas. La novan registaron eniros ankaŭ socialdemokratoj, kiuj deklaris, ke ilia unua laboro estos amnestio al ĉiuj politikaj enkarcerigitoj. Do, se la juĝo ankaŭ estus kondamninta, la amnestio liberigus la kondamnitojn. Tial la juĝistoj ne deziris ludi komedion kaj "senkulpigis". Ĉu vere senkulpigis? Ne. Do parto de tiuj ĉi "krimuloj" jam pasigis 3 jarojn en malliberejo, atendante la juĝan tagon. Kiu rekompencos al ili la akiritajn suferojn, kiu redonos al ili la perditan sanecon? Respondu, ho "bonaj" juĝistoj! *Laborgrupano.*

Eltiraĵoj de K. Marx

Male al malnova socio kun ĝia ekonomia deŝireco kaj politika kaoso alvenas nova socio, kies internacia principo estas — paco, ĉar ĉe ĉiu nacio regos sama principo — laboro.

*

La proletaro devas proklami la simplajn leĝojn de moralo kaj rajtoj. La samaj leĝoj, kiuj reguladas la rilatojn inter individuoj, devas iĝi la pli altaj leĝoj de interrilatoj interpopolaj.

*

La batalo por la laborist-liberigo ne estas batalo por novaj klas-privilegioj, sed: por neniigi ĉian klasregadon. La grundo de socia mizero, spirita subiĝo kaj politika dependeco estas tio, ke la laboro estas subĵetita al posedantoj de la laboriloj. Pro tio estas la ekonomia liberiĝo de homo granda celo, al kiu ĉia politika liberiĝo estu alprenota kiel rimedo.

*

Neniigu la ekspluatadon de homo pere homo, kaj vi per tio neniigos la ekspluatadon de unu nacio pere de alia.

*

Nur ĉe tia ordo, kie malestos klasoj kaj klas-kontraŭdiroj, la sociaj evoluoj, ĉesos esti politikaj revolucioj. Ĝis tiam antaŭ ĉiu nova rekonstruo de la socio la lasta vorto de la socia scienco nomiĝos: "batalo aŭ morto, sanga milito aŭ nenio".

*

La batalo por la liberigo de la laboristaro ne estas lukto por klasprivilegioj kaj monopoloj, sed por egalaj rajtoj kaj devoj, kaj por perei ĉiun klasregadon, la liberiĝo de la laboristaro estas ne loka, ne nacieca, nur socia tasko, kiu staras por ĉiuj landoj, en kiuj ekzistas la hodiaŭa ordo.

Kompilis kaj tradukis *Max Ŝpetrik* (5323)

ATEISMO

Polio, provinco de Romo?

La unua paŝo de novelektita prezidanto de Polio estis longdaŭra vizito ĉe kardinalo Kak . . . ovski.

Do majesto de ŝtatpovo rompis ĉe piedoj de roma servuto.

*

Dum la festoj de "kristkorpa tago" en Polio kelkaj piaj domposedantoj elpendigis ŝtatajn standardojn, klinante ilin dum katolika procesio.

Do, Polio estas servuto de Romo!

Floreto el roma marĉo

En Konstantinov mortis juna laboristo, Lucjan Koralievski, aktiva membro de "Sokol" (Falko). La kadavron eksportis pastro vikario, estrarano de "Sokol". Li ordonis al patrino de l' mortinto pagi 20 flor. Senbezone kanti — gorĝo doloras. Malantaŭ funebra konduko subbrake iris malriĉo kun mizero kaj pala malbonsorto kun malsato.

Super malfermita tombo la panjo ploregas . . . kiel kutime ĉiu panjo. Tio ĉi ne plaĉis al la pastro, li interrompas preĝon kaj admonas:

— Ne blekegu, tie ĉi estas tombejo, ne stalo.

— Jes, efektive, tombejo ne estas stalo; sed panjo, priploranta mortintan infanon, certe ne estas bruto . . .

Trad. *Hohol* (el "Za Wolnošč").

Ad majorem dei gloriam . . .

(Lerneja bildeto)

Urbeto Konstantinov apud Lodz . . .

Johanĉjo Fiszer (Fiŝer) vekiĝis tre frue kaj tre malsata, ĉar je vespermanĝo li formanĝis tri terpomojn kun ŝeloj, kiujn li ricevis okaze de lia panjo, sed estis iom tro malmulte por trankviligi malsaton de 15-jara stomako. Nenio do mirinde, ke li demandis paĉjon: "Paĉjo, ĉu hodiaŭ estos tagmanĝo?" Paĉjo nenion respondis, ekrigardis en flankon de lito, sur kiu depost kelkaj monatoj kuŝas lia malsana edzino kaj ekkraĉas en angulon. Johanĉjo ekkraĉas en la alian kaj ripetis demandon, aldonante: "Ja, hodiaŭ festo de ĉieleniro, se estus almenaŭ terpoma supo." Post interkonsilo Johanĉjo iris al onklo pro terpomoj sep kilometrojn. Malforta, li apenaŭ iris, ripozis kaj ree iris. Tagmeze li estis jam hejme, kaj je la kvara ĉifon-proleta familio manĝis terpoman supon, ĝoje interparolante kaj rememorante bonajn tempojn, kiam ili manĝis terpoman supon kun lardo.

Sekvantan tagon Johanĉjo iris kiel kutime en popollernejon. Unua leciono — religio; pastro prefekto Stanislav Remelski. En klaso silento. Pia pedagogo fiksis serpentan rigardon je Johanĉjo.

— Ci, iru ĉi tien. — Johanĉjo aliras.

— Hieraŭ estis Ĉieleniro, solena festo, kial ci ne estis je diservo en preĝejo, kial?

— Mi hieraŭ . . .

— Silentu, aĉulo. Mi demandis: kial ci ne estis en preĝejo?

— Mi . . .

— Silentu, hundaĉo. Malbenita komunisto. Ci ne volas obei al eklezio?

Ekflagris en lumo de suno bambua bastono. Johanĉjo ekkriegis pro doloro.

— Havu, havu, havu, komunisto, kanajlo, hundaĉo, havu, havu, havu!

*

Tie!, ad majorem dei gloriam punis Johanĉjon F. servus simplex dei en sinjorjaro 1926 en urbeto Konstantinov apud Lodz. *(Hepa "Za Wolnošč")*

Trad. *Hohol.*

≡ FEMINISMO ≡

Laborantaj virinoj en Japanio

S-ino *Icu Nijzuma*

Per "laboranta virino" ni karakterizas virinon, kiu havas okupon kaj laboron en socio. Estas du specoj da laborantaj virinoj.

Ŝokugjoo-fuĵin (ŝokugjoo estas japana lingvo por okupo kaj fuĵin estas virino) estas unu el ili. Ili sin okupas per tio, kiu postulas mensan laboron, kaj ili devas esti pli aŭ malpli edukitaj virinoj.

Laboristino estas la alia speco. Ili apartenas al proletariaro. Ili sin okupas per manlaboro, kiun povas fari analfabetoj.

Instruistino, kuracistino, maŝinskribistino, oficistino, korespondantinoj por gazetaro, flegistino, komizino, akuŝistino, telefonistino ktp. apartenas al la unua klaso.

Fabriklaboristinoj en fadenindustrio kaj ŝpinindustrio, en tinkturejo, presejo, kaj en paperfabrikejo: laboristinoj en minejo, en agrikulturo, kaj en industrio de marproduktaĵo apartenas al la dua klaso.

Multaj virinoj laboradas en profundaj kuprominejoj kaj karbminejoj; kaj ankaŭ multaj laboradas en profundaj maroj por kolekti haliotojn kaj algojn. Tia estos maloftaĵo en alilandoj.

La nombroj de diversaj laborantaj virinoj estas jenaj:

Terkulturistinoj	1 315 900
Fabriklaboristinoj	990 334
Minejlaboristinoj	390 522
Marlaboristinoj	324 000
Fosistinoj, kiuj laboradas je konstruado de vojoj kaj konstruaĵoj	10 200
Servistinoj kaj helpistinoj, kiuj servas dum limigita tempo en diversaj hejmoj . . .	329 500

La nombroj pri la fabriklaboristinoj kaj minejlaboristinoj estas prenitaj el la statistiko de 1925, kaj la nombroj de la aliaj estas prenitaj el la statistiko farita de tokia oficperejo en 1919. Estas klare, ke nuntempe devas esti pli multaj laborantaj virinoj. Preskaŭ 14 % de 27 000 000 japanaj virinoj estas laborantaj en socio.

Lastatempe virinoj eklaboradas en novaj kampoj, kiuj ĝis nun estis konsideritaj aparteni nur al viroj; tamen ankoraŭ ekzistas okupoj, per kiuj neniu virino devas sin okupi. Leĝo ne ebligas al virinoj fariĝi advokatinoj, juĝistinoj, administrantaj oficistinoj kaj policaninoj.

Kial oni malpermesas al virinoj kelkajn okupojn al kiuj virinoj estus pli taŭgaj ol viroj en iuj okazoj? Sin trovas multaj kialoj por tio, sed la ĉefa kialo estas, ke la malnova moro regadas kaj virinoj ne havas egalan ŝancon al viroj en edukado. En Japanio en iuj okazoj virinoj pli multe laboradas ol viroj, tamen ankoraŭ ili estas taksataj pli malaltaj ol viroj.

Laborhoro de laboristinoj en fabrikoj estas 8—13 horoj: plej multaj laboradas 10—12 horojn. Terkulturistoj ĝenerale laboradas de la sunleviĝo ĝis la sunsubiro. Laborhoroj de virinoj en komercejoj kaj oficejoj diferencas laŭ sia speco. Ĝenerale ili komencas je 7.30—9 kaj ĉesas je la 5—6a horo; kaj ilia aktuala laborhoro estas 7 aŭ 8 horoj.

Nun ni nin turnu al ilia laborpago. Unue ni komparu laborpagon de virinoj al la viroj (en jenoj).

	Maksimumo		Minimumo		Mezo	
	virino	viro	virino	viro	virino	viro
Tinkturejo	1.40	2.65	61	96	96	1.58
Mekanika laborejo	1.36	3.57	80	1.07	1.03	2.10
Ĥemia laborejo	1.17	2.82	70	1.16	87	1.78
Nutraĵfabriko	1.21	2.73	69	1.06	91	1.73

Ni povas klare vidi, ke laborpago de virino estas multe pli malalta ol la vira. La suprecitita estas tagpago; ili nenion ricevas, se ili ripozas dimanĉe kaj feste. Se ili fariĝas malsanaj, aŭ faras iun eraron, ili ofte suferas tujan maldungon, ĉar inter ili sin trovas ne multaj spertaj laboristinoj.

Due, ni citu diferencajn pagojn inter virinoj (en jenoj).

	Maksimumo	Minimumo	Mezo	Nombro
Kuracistino	200.00	80.00	150.00	150
Akuŝistino	500.00	80.00	150.00	4617
Stenografino	300.00	90.00	130.00	20
Oficistino	75.00	24.00	35.00	15000
Skribmaŝinistino	120.00	30.00	51.00	1744
Telefonistino	83.00	20.00	35.00	8500
Komizino	85.00	20.00	35.00	4500
Helpistino (kiu servas en mastrumado	45.00	15.00	27.00	1200

(La supre cititaj estas monataj salajroj de diversaj laborantinoj.)

La supra tabelo ne montras la pagojn de ĉiuj laborantaj virinoj, ĝi montras nur etan parton. Kuracistinoj, instruistinoj, stenografinoj en angla lingvo, korespondantinoj, aktorinoj, muzikistinoj kaj verkistinoj akiras la plej altan enspezon inter virinoj pro tio, ke ili daŭre sin okupas per siaj okupoj kaj ili estas pli aŭ malpli edukitaj virinoj. Kontraŭe komizinoj, oficistino, helpistinoj, kaj telefonistinoj, kies okupo estas facile plenumebla de nespertulino, nature pli abundas en nombro ol bezonataj. La plej multo da ili ne laboradas longjare, pro tio, ke ili preskaŭ ĉiam laboradas helpi sian familion, aŭ por prepari por sia edziniĝo. Tial ilia pago estas malalta.

Jam de longe forpasis la epoko kiam oni opiniis, ke virinoj laborantaj en socio estas aŭ tre malriĉaj junulinoj aŭ malmodestaj aĉulinoj. Speciale post la tertremego en 1926, junulinoj kiuj deziras laboron plimultiĝis. La granda kataklismo en kaj ĉirkaŭ Tokio, ŝajnas, igis ilin serioze pensi, ke virinoj ne ĉiam povas vivi depende de siaj patro kaj edzo, kaj ke sen ekonomia memstareco, virinoj tute ne povas postuli egalan rajton. Estas ja tute nature, ke virinoj ekkomprenis la gravecon havi okupon prepari por neatendita malfacila tempo aŭ kataklismo. Estas ĝojinde, ke pli multe da virinoj vekiĝis al la graveco de laboro kaj ekonomia memstareco kiel rimedoj de egala rajto.

Eble pro tio, ke tiuj laborantinoj en mensa laboro nur ekplimultiĝis en lastaj jaroj, ili ankoraŭ ne atingis la staton formi asocion. Nur asocio de flegistinoj postulis ion de siaj dungantoj. Tempo jam venis kiam virinoj en menslaboro ne restadas mutaj al egoistaj dungantoj. Iuj laborantinoj estas maldungitaj nur pro tio, ke ili simple ne plaĉas al dungantoj; kaj aliaj havas sian salajron malpliigita aŭ ŝanĝita en tagpagon pro tio, ke la tempo estas ekonomie malfacila; kaj ili estas tute je la dispono de kapitalistoj. Kial tiu ĉi laborantinoj estas mutaj kaj ne organizas asocion? La ĉefa kialo estas, ke jam tro longe virina vivo estis limigita al sia hejmo, kaj ili ne eniras facile en socie organizan vivon; kaj samtempe ilia okupo estas plejparte privata.

Pri manlaboristinoj, ne estas laborunio konsistanta el nur virinoj, sed viroj kaj virinoj kune organizas laboruniojn. Tiuflanke manlaboristinoj estas pli progresemaj pro tio, ke ili plimulte suferas ol menslaboristinoj. Tamen ankoraŭ ili ricevas multan helpon de viroj. Inter manlaboristinoj tiuj, kiuj kaŭzas labordisputon kaj postulas sian rajton estas laboristinoj industriaj, t. e. presistinoj, tinkturistinoj, fadenigistinoj, ŝpinistinoj kaj ministinoj. Iuj labordisputoj estas kaŭzataj de mastroj pro malpliigo de laborpago, maldungo de laboristinoj sen ĝusta kaŭzo, nepago, plilongigo de laborhoroj; aliaj labordisputoj estas kaŭzataj de laboristoj, kiuj postulas plialtigon de laborpago, plibonan traktadon, reguligon de mona signaĵo je la eksiĝo kaj maldungo. La rezultato de disputoj ĝis nun plejparte ŝajnas rezulti, ke strikantoj iom da plibonigo akiris per tio.

Estas vere, ke virinoj vekiĝis politike same kiel ekonomie. Antaŭe regis la opinio, ke virinoj havas nenion kun politiko; kaj nur tre malgranda grupo da inteligentaj virinoj klopodis por movado por virina voĉrajto. Nuntempe, ĉar ĝenerala voĉrajto por viroj estas efektiviĝonta, virinoj ĝenerale komencis pripensi pri sia voĉrajto. Nova epoko estas venonta, ke laborantaj en diversaj kampoj virinoj, kiuj estas centra forto de ĉiuj virinoj klopodas por virina politika rajto.

Rimarkoj de tradukinto:

I. Unu jeno estas preskaŭ duondolaro.

II. Ĝenerale kuracistinoj multe plimulte enspezas ol akuŝistinoj. Tiuj en la montrita statistiko estas kuracistinoj servantaj en urbaj aŭ registaraj oficejoj kaj kiuj ricevas salajron. Aliaj kuracistinoj, kiuj havas sian propran kuracejon aŭ hospitalon, ofte enspezas pli ol 500 jenojn monate; iuj el ili enspezas 2000 ĝis 10 000 jenojn monate laŭ aŭtentika raporto de kuracistinoj. Ni ne kalkulas tiajn en la statistiko supra, kiu nur enhavas salajrulinojn.

Esp-igis *K-dino 4976.*

Lasthore!

VI. SAT-KONGRESO (LENINGRAD)

Por ricevi la vizojn ĉe sovetiaj ambasadorejoj la **kongreskarto** ne estas bezona. Ili **estos disdonataj en Leningrad.**

La Kongres-Komitato.

Pri forigo de prostituado

Kun granda intereso mi legis en "Senn." la raporton pri luktado kontraŭ prostituado en Sovetio. Tiurilate mi kredas, ke ĉiu liberpensanta homo nur povas aprobi la rimedojn uzatajn de sovetregistaro por tiu ĉi luktado.

Prostituado estas ja socia malbono forigenda; sed oni ne devas, mi eĉ asertas: oni ne rajtas lukti kontraŭ prostituado pere de subpremado kontraŭ prostituistinoj tiam, kiam ankoraŭ ekzistas kaŭzo mem de prostituado, t. e. kapitalista sociordo.

Studante tiun ĉi problemon — oni ne miskomprenu min — mi longe parolis kun prostituistinoj. Nu! mi estas tute certa, ke ili parolis tute sincere; akcenton de sincereco mi absolute trovis en ilia voĉo. Iliaj paroloj povas resumiĝi tiel, kiel diris unu el ili: "Ne kredu, ke estas pro nia plezuro, ke ni prostituiĝas! Ne! tute ne! Ĉu vi povas kredi, ke estas agrable restadi horojn en restoracioj aŭ sur la ŝoseoj! Ĉu agrable sin liveri al viroj, kiujn oni tute ne konas, kiujn oni, kelkajn minutojn antaŭe, estis neniam vidintaj? Ĉu agrable, ĉiam travivi tiamaniere ĉiujn noktojn tiam, kiam oni certe preferus trankvile dormi? Ĉu agrable, riski teruran malsaniĝon? Ĉu agrable, esti preskaŭ ĉiutage devigata trinki, ankoraŭ trinki, eĉ drinki? Ĉu teatroj aŭ kinoj povas ankoraŭ esti agrablaj tiam, kiam spektaklon oni devas viziti preskaŭ ĉiutage?

Ĉu agrable, esti kondamnata neniam ami vere per amo iujn ajn aliun ol fihomon, pro tio, ke la aliaj viroj nin rigardas kun malestimo? Eĉ virinekspluatisto fariĝis mito, ĉar spite la malestimo granda, per kiu plejmulto rigardas nin, ni tamen havas nian fierecon, kaj ni ne povas ami virinekspluatiston tial, ke ni tiajn virojn malestimas; cetere plejmulto el ni rifuzas nun esti ekspluatata kia ajn estu la formo de ekspluatado. Ni do estas kondamnataj je neniama amo.

— Kial do vi elektis tian vivmanieron?

— Ĉar ni tamen preferas tion, anstataŭ plena sklavecon, kion oni trovas en laborejo kun ĝenerale lacigega laboro, kaj ĉar plejofte tiuj virinoj, kiuj laboras, gajnas salajron tro malaltan, por ke per ĝi ili povu sin nutradi. Cetere ni, preskaŭ ĉiuj, iam laboris, sed pro nia tromalalta salajro, ni jam tiutempe post nia laboro devis prostituiĝi por ricevi kompletigan monon ebligante, ke ni vivu; iom post iom ni forlasis sklavigegan, lacigegan, malagrablegan laboron. Inter du malbonaĵoj ni elektis la malpli malbonan.

— Do, se oni donus al vi laboron, kiu estus nek tro laciga nek tro sklaviga, t. e. ne tro malagrabla, kaj per kiu vi povus sufiĉe bone vivi, ĉu vi forlasus prostituadon?

— Jes! mi preferus eĉ ricevi iom malpli da mono per alia rimedo, kondiĉe, ke mi povu vivi alie ol en malsana subtegmenta ĉambro, kaj aliel ol dronanta en mizero.

— Ĉu vi kredas, ke viaj kamaradinoj sincere samopinias kiel vi!

— Flankenlasante kelkiujn, kiuj eble povas ŝati tian vivmanieron, mi estas tute certa, ke ĉiuj opinias tute same kiel mi.

Estis alveninta la tempo kiam mi devis foriri; mi do adiaŭis mian kunparolantinon per kelkaj esperigaj paroloj kaj foriris kompreninte, ke nedubeble prostituado malaperos, kiam laboro fariĝos ne teda, konforma je la inklino de ĉiu individuo, ne plu malagrabla, t. e. kiam estos starigita plena socialista reĝimo. Ĝis tiam ĉiu virino povas — sendube prave — opinii, ke ŝi rajtas vivi sen laciga, malagrablega laboro kaj ricevi tiom da mono, kiom ŝi sukcesas ricevi.

Do, se ni volas — kaj ni volas — malaperigi prostituadon, ni ĝis morto kontraŭbatalu kapitalistan reĝimon; ni ĉien venigu proletaran revolucion kaj, kiel eble plej baldaŭ starigu ni plenan socialistan reĝimon.

Por tio, fratoj SAT-anoj, ni kuraĝu! Al revolucia batalo! *R. S. 140*

Virino en Sovetio

La partopreno de virinoj en landregado pli kaj pli kreskas. En jaro 1920 nur 3% de la lokoj en la sovetoj estis okupitaj per virinoj, nun jam 21%. En RSFSR 60 000 kamparaninoj estas membroj de la vilaĝaj sovetoj. 1925 estis elektitaj kiel juĝejasesoroj 2 129 virinoj en guberniajn juĝejojn, en distriktajn juĝejojn 10 199 virinoj, kaj en vilaĝajn lokajn komitatojn 21 884. En profesiaj sindikatoj estas 1 725 725 virinoj. 47 000 virinoj estas membroj de Tutunuiĝa Komunista Partio, kaj 61 000 — kandidatinoj al ĝi. Nelegivo estas likvidita inter 300 000 vilaĝaninoj.

— "Ĉiu kuiristino devas kapabliĝi, regi la landon" diris k-do Lenin!

Komunikis *H. Frank, Perm*

SAT kaj laboristaj partioj

Interese estas kompari SAT kun laboristaj partioj. Analogaj ili estas. Ambaŭ celas klaskonsciigi la laboristaron kaj konsekvence igi ilin klasbatalemaj. Fari el la senpensa laboristmaterialo — klaskonsciajn proletojn.

Ni do unuarigarde dirus, ke iliaj spiritoj estas samaj. Sed tamen ne estas tiel.

Antaŭ nelonge tutprave skribis al mi germanlingva k-do: En Germanio ĉe laboristaj festoj flirtas nacikoloraj flagoj. Mi komprenas lian indignon. Sed, ĉu nur en Germanio? Ne, en ĉiuj landoj, nur eble Sovetio esceptas. En Ĉekoslovakio pasintjare ĉe disvolvo de la ruĝa standardo oni ludis nacian himnon.

Kie do serĉi la kulpon? Ĉu la gvidantoj ne konscias pri la disiga influo de naciismo? Ili, kiel klarevidaj, poliglotaj sagaculoj? Trompas, jes, gvidantaj k-doj trompas.

Ni iom priatentu ilin. Ne estas malofta fenomeno, ke laboristgvidanto havas proprajn personaŭtomobilojn, vilaon ktp. Iuj havas centmilajn enspezojn.

Ĉu ilia ideologio identas kun tiu de senlaboruloj? kiuj havas eĉ ne ĉemizon?

Ho, kompatindaj laboristoj.

Ridinde estas atendi, ĝis milionula gvidanto vin alarmos. Al li plaĉas ja en patrio. Li ne devas veturi fremdlanden por serĉi panon, al li polico ne pafas. Do, kial li proklamu sennaciismon?

Nun venis seniluziiga periodo por la laboruloj en Ĉekoslovakio. Sekve de registara aborto (leĝprojekto pri altigo de limimpostoj kaŭzonta plikariĝon de vivbezonaĵoj) oni dufoje jam, en la ĉefurbo Praha, pafis al la demonstrantaj laboristoj. Ambaŭfoje pluraj vunditoj. Rajdpolicistoj enveturis la masojn kaj ĉevalhufoj faris sian pereigan destinon. Kaj je kiom pli grandiĝos la nombro da viktimoj, ĝis kiam ĉi-linioj estos presitaj? De lando al lando migras agresemo de la kapitalista vampiro. Laŭorde, sinsekve.

Sed ni revenu al la temo.

Ekzistas nur alternativo: Aŭ SAT-anoj ne estas bonaj partianoj, aŭ necesas fari modifon je la spirito kaj kirurgian tranĉon je la membraro de partioj.

Ne diskutebla, okulfrapa afero.

La gvidantoj fordonu ĉiun monon al la partioj, kiuj ilin salajras. Ĝi ja apartenas al ili. Se socialigi, do antaŭe en propraj vicoj. Certe, ke kelkaj perdos la "entuziasmon", sed, ĉu domaĝas?

Se la amasego da laboristaj gazetoj kaj oratoroj ĝuste, senhipokrite farus sian komision — ĉu malproksime estus liberiĝo de la laboruloj?

— Kaj kontraŭ propraj generaloj . . .

5194

≡≡ TURISMO ≡≡

Ekkono

Tradukita laŭ informoj de la T. A. "La Naturamikoj" gazetarservo, Wien

Kontraŭ la fabriko estas gastejo. Kiam sabate la fabriksireno sonante anoncas la liberan tagon, baldaŭ homamasoj forlasas la pordegojn kaj la alitempe malplena strato pleniĝas. Poste tra la malaltaj pordoj de la gastejo premadas sin sennombraj figuroj, junaj kaj maljunaj, kun gaja mieno en siaj vizaĝoj. Kaj interne ankoraŭ pli laŭte ili "amuzas" kaj dum longaj horoj kunrestadas. En malodora fumo sidas la homoj, antaŭ ili staras glasoj kun trinkaĵoj, kio forprenas multe da mono de ili, portante ĝin en la sakojn de la plej grandaj laboristmalamikoj.

Tie sidas grizharulo, apud li junulo. Ambaŭ rapideme trinkas sian vinon. Unu jam je fino de sia vivvojo, alia je komenco de la sama kion la alia jam preskaŭ fingustumis. Kiam ili eniris gastejon, alia laborkolego rigardis ilin. Ties lipoj fermiĝis pro interna doloro. Li portis emblemon, sur ĝi kuniĝantaj frataj manoj (emblemo de la naturamikoj). Malrapide, ĝemante li pluen paŝas, hezite, ĝis la

proksima angulo. Tie li ekstaras, denove returniĝas kaj rerapidiĝas. Sed nun ne hezite, sed jam de pensado liberigite, la decidecon eĉ oni povas vidi sur lia mallarĝa vizaĝo. Li eniras ankaŭ en la gastejon kaj paŝas al tiuj du kune sidantoj. Ili sufiĉe ŝatis lin, ĉar li estis bona kamarado kaj sia iom infana aspekto eĉ malebligis al ili la mokemon, kion jam dum trinkadoj ili tiel alkutimiĝis. Li parolas komence balbutante, poste ĉiam pli flue, pli insiste. Li petas ilin ekkaptinte iliajn de laboro malglatajn manojn. Liaj vortoj tremas de ekscito. Kaj vidu, fine ili ambaŭ konsentas. Do, bone Petro, ni iras kun vi en arbaron, sed poste ankaŭ por bona guto, rimarku tion!

Petro nun ankaŭ ĉion konsentas, por li estis komence nur grave, ke li ilin gajnis por kuniri. Kaj vere, alian matenon ĉiuj tri kunmarŝas sur la bela arbarvojo. Je komenco murmuras la du kunuloj, kiuj ankoraŭ ne kutimiĝis al la irado pro la varmego kaj nenecesa strečado. Sed ilia gvidanto rakontas kaj plenigas iliajn cerbojn per multaj pensoj kaj insistoj, kiujn ili ekkomencas pripensi, kaj subite ili vidas aferojn pri kiuj ĝis nun ili eĉ ne sonĝis. La tempo rapidege pasis kaj baldaŭ vesperiĝas. Ili reen marŝas al la urbo, venas jam al la unuaj stratoj, sed nek unu de la du novaj migradkamaradoj parolas plu de la "bona guto". Ili pretermarŝas la trinkejon. De interne bruado aŭdiĝas, du ebriuloj elvenas, unu el ili vomas dum teruraj spiregoj. Petro nenion diras, li nur rigardas siajn kunulojn. Tiam ĝemas la junulo duonvoĉe: Tio estas terure malbela! Kaj rapide ili pluenmarŝas.

Je la adiaŭo la maljunulo, kiel laca infano, iom sin ĝenante, nur diras: "Dankon, Petro, venontan dimanĉon ni denove kuniros". Kaj la junulo ridas, ĝoje ekkrias: "Bele estis, bela estas la mondo".

≡ DISKUTEJO ≡

Pri "frontunueco"

NECESECO DE DISCIPLINO. — Difininte la kondiĉon necesan kaj sufiĉan por ebligi la kunlaboradon de diversspartiaj elementoj en sama asocio, utilas nun aldoni, ke plie obeemo al la statuto kaj akcepto de l' decidoj regule alprenitaj de plimulto estas ankaŭ nepre necesaj.

Pri ĉi tio eble ne ĉiuj konsentos. Estas ja anarkistaj k-doj (ne ĉiuj), kiuj akcepti ne konsentas ian ajn regulon, ne sentas sin ligitaj per decidoj de plimulto. Ili argumentas per cito de historiaj faktoj kaj per logikecaj rezonoj, ke plej ofte la plimulto eraras. Povas esti. Sed kiu kuraĝos aserti, ke *ĉiam* la malplimulto pravas?[1]) Tamen necesas, ke okazu decidoj; necesas, ke ili estu aplikataj. Konsekvence oni staras antaŭ jena alternativo: aŭ konsideri, ke la vidpunkto de la malplimulto estas ĉiam sole ĝusta, kaj sekve plenumi la dezirojn de la malplimultanoj; eĉ la deziron de unu sola membro, ĉar evidente laŭ tia principo ju pli malgranda estas la malplimulto, des pli ekzistas da ŝancoj, por ke ĝia vidpunkto estu la ĝusta; — aŭ simple agi, kiel oni faras kutime, t. e. apliki la decidojn alprenitajn de l' plimulto.

Se tiuj decidoj estas neĝustaj, la sperto, la vivo mem montros ties malĝustecon. Tiam tutcerte la malplimulto fariĝos la plimulto kaj finfine sukcesos akceptigi sian tezon.

Sed kion opinii pri k-doj, kiuj eksiĝas tuj el organizo, se ilia persona vidpunkto ne trovas ĝeneralan aprobon? Kion opinii pri batalantoj, kiuj forlasas la batalkampon ĉe la unua malvenketo?

Necesegas, ke ni ĉiuj forte konvinkiĝu, ke ne povas iu ajn grava asocio funkcii, se ĝiaj membroj ne akceptas disciplinon. Nur interlaŭdaj klubetoj kaj mizeraj sektetoj povas ekzisti sen reguloj, sen akcepto de disciplino.

Sed eble tia mia parolo estas tro ĝeneraltema. Preferinde mi konsideru konkretan ekzemplon. En la Leipziga Redakci-komisiono okazis antaŭ kelkaj monatoj debato pri akcepto aŭ rifuzo de artikoleto, kies enhavo estis protesto kontraŭ unu sekcio de l' III. Internacio, nome la t. n. rusa sekcio, kiu havas la regpotencon sur unu sesono de l' mondo. La plimulto en la komisiono (t. e. la socialistoj, la komunistoj kaj senpartiuloj) ne konsentis pri la publikigo de la nomita protesto, argumentante, ke tia publikigo enkondukus ĝuste la "disputpunktojn", kiuj, laŭ la deziresprimoj de SAT-kongresoj, estas nepre evidentaj. Nu, la du anarkistaj redakci-komisionanoj, konstatante, ke ilia vidpunkto ne havas la plimulton, simpli eksiĝis! . . .

En tiu okazo, ĉu la plimulto pravis aŭ ne? Ne temas nun tion ekzameni. Persone mi opinias, ke eble estus preferinde trovi ian aranĝon, kiu kontentigus ambaŭ partojn; sed eĉ en la okazo de malpravo flanke de l' plimulto, la eksiĝo de la du malplimultanoj estas nepre riproĉinda. Tia maldisciplinemo ne kongruis kun la situacio, ne akordiĝas kun la necesaj ekzistokondiĉoj de iu ajn asocio.

Necesas submetiĝo de l' malplimultanoj al la decidoj regule alprenitaj. Necesas disciplino.

*

ĈU EKZISTAS KRIZO EN SAT? — Al tiu demando mi respondas senhezite: jes. Kaj tuj aldiras, ke tiu krizo ne estas nova fenomeno en la vivo de nia organizo. La krizon okazigas tio, ke jam ne ekzistas *ia* spiritostato, sufiĉe forta, kiun mi nomos *sataneca.* La krizo estas daŭra, tial ke la eksteraj fluoj, puŝoj iafoje tro sentiĝas en niaj vicoj. Unuvorte la partieco iafoje superas la junan satanecan spiriton. Mi parolu sen ia ĉirkaŭfrazo: Estas fakto, ke komunistoj (ne ĉiuj) deziras, ke SAT estu pure komunista; faktas, ke socialistoj (ne ĉiuj) deziras, ke ĝi estu pure socialista. Same dirite pri la aliaj tendencoj.

Estas ĉiam la sama eraro: tiuj k-doj volas fari el nia organizo ian filion de sia partio. Ili ne sufiĉe klare vidas, ke SAT estas vivrajta, nur se ĝi havas specialan karakteron; se ĝi havas tute limigite difinitan celon.

Tia sama estas ankaŭ la opinio de k-do Zilberfarb. Kun kontento mi notas la fakton. Sed mi ne povas konsenti kun li, kiam li parolas pri "SAT en danĝero", tial ke kelke da liaj samtendencanoj eksiĝis.

Nia asocio estus ja en danĝero, se la plimulto el la membroj ne akceptus disciplinon, estus ĉiam pretaj eksiĝi, se ilia propra vidpunkto ne estas akceptata. Feliĉe la granda plimulto da SAT-anoj konsentas submetiĝi al la decidoj regule alprenitaj. K-do Zilberfarb agus pli laŭcele, se anstataŭ paroli pesimisme (pesimismo ne pravigita de faktoj), li konsilus al siaj samtendencanoj, ke ili agu en la kadro de SAT mem por akceptigi la proponojn, kiujn ili opinias ĝustaj, anstataŭ eksiĝi kaj provi ekzistigi konkurencan organizon . . .

Mi ne volas diri, ke neniam mispaŝoj estis farataj flanke de SAT-respondeculoj. Kiu neniam eraris aŭ mispaŝis, ĵetu al ili la unuan ŝtonon! Sed tiu agus tute nelojale aŭ blindfanatike, kiu asertus, ke la gvidantaro de nia asocio sisteme alpremis iun ajn tendencon. Ĉu estus lojale riproĉi, ke la anarkista penso estas ĝenata, bridata en SAT, kiam oni scias, ke en nia biblioteko kuŝas: "Tri Verkoj de Tolstoj" kaj "Etiko" de Kropotkin?

Tiaj verkoj ja havas lokon inter nia libraro, ĉar ne decas, ke klera komunisto aŭ socialisto ignoru la anarkistajn teoriulojn. Same ĉu decas, ke anarkistoj ignoru la verkojn de Marx, Kautsky, Lenin kaj aliaj pensuloj? SAT devas esti klerigejo, edukejo (kaj ne agitejo politika). Sekve necesas, ke la membroj havu en manoj la necesajn klerigilojn kaj edukilojn.

Sed, kiam estas dirite en artikolo, ke la komunistoj estas servistaĉoj subaĉetitaj de Moskvo; aŭ ke plejparto da anarkistoj estas simple spionoj, ĉu pravas aŭ ne la redaktoro, kiu ĵetas en korbon tian skribaĵon?

Jes, ekzistas krizo en SAT. Necesas atenti ĝin, kaj la avertoj de k-do Zilberfarb ne estis senutilaj. Sed li agus saĝe, se li kelkfoje bonvolus konsideri, ke la "kulpuloj", pri kiuj li aludas, ne ĉiuj troviĝas ekster la anarkista tendaro . . . *E. Lanty.*

(Pluo sekvos.)

[1]) Mi ja scias, ke la fama dramverkisto Ibsen havis tiun kuraĝon. Sed ne estas ĉi tie nun la loko por diskuti la paradoksecon de la diroj, kiuj metis Ibsen en la buŝon de unu el siaj herooj.

Ŝipkaravanoj al Leningrad

La plej multaj k-doj certe veturos per la ŝipo de Hamburg la 1. Aŭgusto vespere por 60 mk. g. K-doj ne veturontaj trans Leipzig ankaŭ anoncu sian alvenon ĉe k-do *Herm. Theobald,* Hamburg-Altona-Steenkamp, Im Hag 5, por ke li povu akcepti ilin en la stacidomo. *Nur* la k-doj veturontaj de Stettin sendu antaŭe la monon por unu veturo (40 mk. g.) al k-do *O. Bässler,* Leipzig C 1, Gerberstr. 24, por ke ni eble per kolektiva aĉeto de la ŝipbiletoj ricevu ankoraŭ iom da rabato. Pli detalaj informoj sekvos per cirkulero.

ESPERANTO-MOVADO

Henri Barbusse denove laŭdas Esperanton

Ni preferus publikigi tekston originale verkitan en esperanto de H. Barbusse, ol tiun tradukon de franclingva laŭdo al nia lingvo. Tamen ni opinias, ke la entuziasmaj diroj de la mondfama aŭtoro estas diskonigindaj. Ili ja povas helpi al la k-doj en ilia propagando por altrudo de mondlingvo al la proletaro. *Red.*

Karaj gekamaradoj!

Ĉar mi ne povas, malgraŭ mia ega deziro, partopreni la laborojn de via sesa kongreso, mi sendas al vi la esprimon de mia frata solidareco, de mia fido kaj de mia espero.

La grandega verko efektivigota de l' estonteco — ĉiuj sociaj kaj ekonomiaj faktoj tion certigas — estas la metoda internaciigo de l' mondo. Tiu internaciiĝo estas fatala en sia plensignifa formulo; eĉ, ĝi jam ĉiufake parte realiĝas, pli aŭ malpli malrapide kaj konscie, tiom inter laborista amaso, kiom inter ties klasmalamikoj ankoraŭ ĉiopovaj. Al tiu logika formulo celas la tuta universala vivo.

Sed, vi laboras, gekamaradoj, por konstrui parton, fundamenteron — ne la malpli firma kaj konkreta — de tiu organisma entrepreno, ŝanĝonta la nunstaton. Ĉiuj ni suferas laŭ niaj ardaj malpaciencoj, konstatante la malrapidon de l' subpremata amaso por kompreni, ekmoviĝi, organiziĝi. Se ĝi volus, ĝi estus tutpotenca. Ĝi ankoraŭ ne volas, ĉar ĝi ne scias kiuj kaj kie estas ĝiaj veraj interesoj.

Koncerne la fakan taskon, kiu hodiaŭ grupigas vin, la proletara opinio ne sufiĉe konscias la gravecon de plurlingva barilo. Tie sidas kvazaŭ armaturo de la popolapartigo. Se ĝi tion vidus, ĝi akceptus la ilon, kiun vi proponas por eliĝi je tiu enkarcerigo, je tiu memfakigo de l' monda popolo, kies mizeroj kaj aspiroj similas ĉe ĉiu terpeco.

Tiu rimedo por reala unuiĝo estas admirinda pro simpleco kaj realismo. Ĝin kreis grandaj spiritoj klarvidaj pozitivaj; Esperanto estas interpenetrilo tiom taŭga, tiom scienca, ke ĝi posedas la magian povon de la scienco mem. Ĝi estas tiom konforma je l' urĝegaj bezonoj de l' universala vivo, ke ĝi estas pli ol ilo, sed nova organo necesa por la tutmonda kolektivo.

Se ĉiuj estus konsciaj kaj pretaj, se la granda revolucio, kiun ni akre revas, realiĝus saĝe, ĝi estus ĉie komencinta sian realiĝon per la kreo de tiu kvazaŭa sangretaro: unika lingvo.

Sed ni scias, ho ve, ke ne tiaj estas la kondiĉoj de l' nuna granda batalo. Ĝi fatale estas kaosa, era, kaj la premadpersekutado de l' estroj trudas iajn tujajn kontraŭagojn. Estus tro bele, se oni ĉie povus komenci ĉe la komenco.

Sed kiel ajn realiĝos la justeco kaj l' ekvilibro socia, ĉiuj viaj nunaj klopodoj estas ege gravaj; ĉiu peno via trafas. La diskonigo de la lingvo internacia estas konkreta kaj neperea rezultaĵo. Statistikoj montras la plivastigon kaj l' obligon de via lingva akiraĵo. La esperantistoj estas precizaj efektivigantoj de internaciismo, ili malaperigas, iom post iom, la disiĝon de la tiel nomataj "fremduloj".

Streĉu do, gek-doj, vian agemon, vian energion; ke la certeco de l' nunaj progresoj kaj estontaj venkoj gvidu kaj akcelu vian laboron. Kun tiaj pensoj mi tutkore komplimentas la anojn de l' sesa kongreso de l' franclingva laborista esperanta federacio.

Vivu la unuiĝonta proletaro!

Henri Barbusse.

Trad. el la franca *SAT-ano 740.*

. . . Sed mi scias praktikan utilecon de Esp-o[1])

Dum la 2. gubernia konferenco de lab. kaj kampar. korespondantoj en *Smolensk* (Sovetio) raporton pri *Internacia Korespondado* faris k-do Nilov, sekretario de gazeto "Raboĉij Putj" (Laborista Vojo). Estas interese, ke k-do Nilov ne estas Espisto, sed dum sia tuta raporto, li laŭdis Esp-on. Kiam unu "labkor"o demandis lin: "Kiu lingvo estas plej bona — Ido aŭ Esp-o", k-do Nilov respondis:

"Mi scias nek unu, nek alian lingvon, kaj juĝi ilian teknikan aranĝon mi ne povas, sed mi scias praktikan utilecon de Esperanto. Al ni en redakcion venis Espistoj kaj Idistoj, kaj proponis: 'Uzu nian lingvon'. Ni estis kontraŭ Esp-o kaj kontraŭ Ido, sed ni diris: Laboru, 'knaboj', donu materialon. — Rezulte la **Espistoj donis al ni ĉ. 100 eksterlandajn leterojn; la Idistoj donis ne eĉ unu!**"

La faktoj parolas elokvente. *I. L.*

1) Municio por propagandistoj.

Evolucio, Revolucio kaj Anarkisma Idealo

de *Elisée Reclus* (Fino)

Efektive evolucio entenas la tuton de humanaj aferoj, kaj revolucio devas ĝin ĉirkaŭligi ankaŭ, kvankam ne ekzistas ĉiam evidenta paraleleco en la partaj okazajoj, el kiuj konsistas la tuto de la vivo de socioj. Ĉiuj progresoj estas solidaraj, kaj ni ĉiuj deziris ilin laŭmezure de niaj konoj kaj forto: sociajn aŭ politikajn progresojn; moralajn kaj materiajn, sciencajn, artajn aŭ industriajn. Evoluciuloj en ĉio samgrade revoluciulo ni estas sciante, ke historio mem estas nur serio de plenumoj sekvantaj serion de preparadoj. La granda intelekta evolucio, kiu liberigas la spiritojn havas, kiel logikan konsekvencon, la liberigon, fakte de individuoj, en ĉiuj iliaj rilatoj kun la aliaj individuoj.

Tiel oni povas diri, ke evolucio kaj revolucio estas la du sinsekvaj fazoj de sama fenomeno, evolucio antaŭiranta revolucion, kaj tiu-ĉi antaŭiranta novan evolucion, kiu siavice naskos estontajn revoluciojn: ĉu ŝanĝo povas okazi ne kaŭzante subitajn alilokigojn en ekvilibro de la vivo? Ĉu revolucio ne devas nepre sekvi evolucion, same kiel ago sekvas volon de ago? Unu kaj alia nur diferenciĝas laŭ la epoko de apero. Se granda ŝtona defalaĵo baris riveron, la akvoj amasiĝis iom post iom supre de la baro, kaj per malrapida evolucio, lago formiĝis; subite trasorbiĝo okazas en la suba digo, kaj falo de ŝtono kaŭzas kataklismon: la baro estas perforte renversita kaj la malplenigita lago refariĝas rivero. Tiel okazas eta tera revolucio.

Se revolucio malfruas je evolucio, la kaŭzo kuŝas en la kontraŭstaro de la medioj: la akvo de fluo bruetadas inter siaj bordoj, ĉar tiuj-ĉi malhelpas ĝian iradon; tondro ruladas en la ĉielo, tial ke atmosfero kontraŭiĝis al fajrero elirinta el nubo. Ĉiu transformiĝo de materio, ĉiu realigo de ideo estas, dum la periodo mem de ŝanĝiĝo, malhelpata pro inerteco de la medio, kaj la nova fenomeno nur povas okazi per penado, des pli intensa, aŭ per forto des pli potenca, ju pli la kontraŭstaro estas granda. Herder, germana poeto parolante pri la franca revolucio jam diris: "Semo falas en teron, dum longe ĝi ŝajnas mortinta, poste subite ĝi elpuŝas sian stangeton, forĵetas la malmolan teron, kiu ĝin kovris, perfortas la malamikan argilon, kaj jen fariĝas kreskaĵo, kiu ekfloras kaj maturigas sian frukton. Kaj la infano, kiamaniere ĝi naskiĝas? Post naŭmonata restado en la mallumo de la patrina ventro perforte ankaŭ ĝi eliras, disŝirante sian envolvaĵon, kaj iafoje eĉ mortigante sian patrinon". Tiaj estas revolucioj, necesaj konsekvencoj de evolucioj, kiuj ilin antaŭiris.

La proverbaj formuloj estas ege danĝeraj, tial ke oni volonte alkutimiĝas ilin ripetadi senkonscie, kvazaŭ por eviti pripensi. Tiel oni tede ripetadas la vorton de Linné: *"Non facit saltus natura"*. Sendube "naturo ne salte iradas"; sed ĉiu el ĝiaj evolucioj efektiviĝas per translokiĝo de fortoj al nova punkto. La ĝenerala vivmovado en ĉiu estaĵo ne montras al ni ie ajn rektan daŭrigadon: sed ĉiam malrektan sinsekvon, revolucian, se tiel oni povas diri. Branĉo ne aliĝas laŭlonge al alia branĉo. Floro ne estas la plilongigaĵo de folio, nek pistilo tiu de stameno, kaj ovujo diferenciĝas de la organoj, kiuj ĝin naskis. Filo ne estas daŭrigo de la gepatroj, sed nova estaĵo. Progreso okazas per senĉesa ŝanĝo de la deiraj punktoj por ĉiu individuo aparte. Same por la specoj. La genealogia arbo de la estaĵoj estas, kiel la arbo mem, branĉaro, el kiuj ĉiu trovas sian vivforton, ne en la antaŭa branĉo, sed en la devena suko. La grandaj historiaj evolucioj ne okazas alimaniere. Kiam la malnovaj kadroj, la tro limigitaj formoj de la organismo, fariĝis nesufiĉaj, vivo transloĝiĝas, por realiĝi en nova formo. Revolucio okazas.

El franca lingvo tradukita de *Frida Noël.*

INTER NI

Ni estas klaraj, kion ni intencis per nia "Socialisto" kaj se k-do Eŭtrapel estus pli bone konanta la cirkonstancojn en Aŭstrujo kaj la laboristan movadon entute, li verŝajne ne uzus biblian, kvankam veran? *rakonteton, klopodante konvinki nin al sia opinio, sed plene konsentus kun ni kaj ne blovegus en la saman trumpeton kun la burĝanoj.*

Ĉar mi nun jam respondas, kvankam nur kiel nefunkciulo, do senpartia observanto, mi samtempe volas respondi ankaŭ al la antaŭe en "Senn." aperinta kritiko pri la "La Socialisto" kaj se eble ĉesigi la diskuton pri "partikularismo".

Al la kritiko sufiĉu jena respondo, kiun mi jam donis okaze de nia landkonferenco en Baden.

— Gazeto, antaŭ ĉio estas parolilo de iu movado, sen kies kunhelpo ĉiu peno, en ĉiu rilato restus senfrukta aŭ malgraviĝos. Ju pli da gazetoj servantaj al iu movado ekzistas, des pli bonaj estos la sukcesoj, des pli granda ĝia forto kaj potenco. Granda, super la nacioj etendiĝanta gazeto ("Senn.") ne povas sin dediĉi al traktado de ŝajne malgravaĵoj de malpli granda grupo, kvankam tiu servas al sama movado, kvankam tiuj montriĝas kiel gravaĵoj kaj vivnecesaĵoj por ĝi. Estas tial memkompreneble nur salutinde kaj akcelote, se plua organo kunluktas disvastigi saman penson kaj idealon. Tiukaze neniu povas paroli pri konkurenco, kiel ekz. al negocistoj vendantaj saman specon da drapo.

Nun pluen, k-do Eŭtrapel, ĉu vi scias, ke en Aŭstrujo ekzistas ankaŭ burĝa gazeteto, la "Aŭstria Esperantisto" kaj disaŭdigilo, per kiu okaze de Esp-o-kurso preskaŭ post ĉiu kurshoro estas varbata por tiu ĉi gazeteto kaj kiu malgraŭ tio tute ne volas kreski? Estas kompreneble, se la aŭstriaj UEA-anoj kondamnadas la ekaperon de nia "Socialisto", ĉar tiu ĉi gazeteto verŝajne kaŭzis jam pluan maldensiĝon de ilia legantareto. Aliflanke estas mirinde, ke "Heroldo" al la aŭstriaj UEA-anoj neniam riproĉis konkurencon aŭ partikularismon, kiam ili eldonis sian gazeteton, kvankam "Heroldo" mem staris antaŭ la preskaŭa pereiĝo.

Ili pli bone komprenas la gravecon de la frazo: "Ju pli da gazetoj servantaj al iu movado . . ." Kaj vi, k-doj, lasis vin senkonscie kapti kaj uzi kiel kondamnintoj de niaj agadoj. Tial, k-doj, ne riproĉu al ni partikularismon.

Ne deziru la baldaŭan fiaskiĝon *de nia "Socialisto" sed* — kunhelpu *gvidi ĝin al tiu alteco, kiu indas al la alta nivelo de la aŭstria laboristaro. Levka (6631)*

Ĉu laŭdinde?

(Pri niaj propagandaj presorganoj)

La propagando por SAT estas ne tro bone organizita: niaj k-doj ĉiutage, ĉiumomente preterlasas bonegajn okazojn por ion fari por SAT!

Nedelonge mi devis noti, ke la Essen'aj k-doj publikigis lernolibron *sen mencio* de nia Esp.-mondorganizaĵo. En la respondo al mia artikoleto ili diras, ke "Esperanto-Fibel" estas la prepara ŝtupo al "Petro"?

Bedaŭro, k-doj! Bedaŭrego! Kie estas reklamo por "Petro"? Kial vi ne uzas la bonan okazon antaŭparoli por "Petro" en la ekzemploj? Mia kritiko estis do ne senbaza!

Hodiaŭ mi havas la ĉagrenon denove reveni al la temo.

K-do Lanty parolis en la SAT-jarlibro 1926 pri tio, ke "SAT povus esti jam pli ol *dekmilmembra*" (Enkonduko, pĝ. 6). Nu, li estas tre modesta. Sed, aliflanke, multaj k-doj tiametode laboras, ke ni neniam atingu eĉ la cititan ciferon.

Kio estas hodiaŭ la bazo de nia propagando?

— La nacilingvaj presorganoj!

Sed bedaŭrinde nur "Lingvo Internacia" de SEU havas la aspekton de gazeto favora al la samon. La polico ŝanceliĝis. Rapide alvenis la ĝendarmaro kaj soldataro. Ĉe la eniro al "Kalimegdan" la studentoj kaj laboristoj konstruis barojn el verdaj benkoj. Malantaŭ la baroj, ili per ŝtonpluvoj celis la ĝendarmaron, tuj kiam ĝi provis ilin forpeli el iliaj pozicioj.

La konfeso de spiono

(El pasintaj tempoj)

Sentinte, ke la fino de la vivo alproksimiĝas, Sima Ignjatoviĉ kolektis la lastan forton kaj trankviligis sian konsciencon per jena konfeso:

Antaŭ 23 jaroj mi ne estis komercisto kiel nun, sed mi estis sekreta policagento.

Antaŭ la fama "Marta Demonstracio", kiu okazis la 23. Marto 1903 (en Belgrado), oni sentis ĉiupaŝe, ke io granda prepariĝis.

Kelkaj preparitaj komplotoj kontraŭ la reĝo kaj registaro estis ĝustatempe malkovritaj.

Alia tasko estis, observi la socialistojn. Tio estis al mi facila, ĉar mi jam delonge sukcesis enŝoviĝi en iliajn vicojn kaj ĝui la konfidon de la gvidantaro. Mi sciis kion oni pensis kaj intencis.

Antaŭ la Marta Demonstracio oni havis en la socialista klubo sekretan kunsidon. Tiam ankoraŭ ne estis organizita la socialista partio. La laborista movado estis apenaŭ en vekiĝo. En la kunsido estis ankaŭ mi, ĉar krom la invititaj personoj partoprenis pasive ĉiuj laboristoj, troviĝintaj en la klubejo. Ĉiuj tiamaj kluboj de la "Granda Lernejo", sendis du delegitojn, ke ili priparolu la morgaŭan demonstracion. Post mallonga diskutado estis decidite, ke morgaŭ, la 23. Marto, ĉiuj studentoj venu al "Mali Kalimegdan". Tie ilin atendos la komerckomizoj, kiuj ĝis la deka devas fini sian protestkunvenon ĉe "Takova" kaj tiam ili unuigitaj trankvile kaj sen malordo, manifestu tra la urbo.

Ankoraŭ la saman vesperon mi raportis al la sekretario X.

"Aŭskultu! Ignjatoviĉ", diris li post mallonga meditado.

"Al mi ne plaĉas ilia decido! Ni devas radikale finigi tiun stratan koton, kiu kiel torento ŝovas antaŭ si ĉiun malpuraĵon kaj volas paroli pri ia politika pureco.

Vi iru morgaŭ al la kunveno de la komerckomizoj. De tie vi iru kun la grupo al "Kalimegdan" kaj kuniĝu kun la studentoj. Vi scias, ke ĉi tiu demonstracio devas esti maltrankvila. Eniru la unuajn vicojn, sed atentu, ke vin neniu ekkonu. Se vi rimarkos, ke la tumulto tamen finas trankvile, vi ekprenu oportunan okazon kaj disbatu la fenestregon ĉe la redakcio de "Male Novine" (Malgrandaj gazetoj). La amaso estas stranga! Se vi montros novan vojon, ĉiuj akceptos. La plua estas nia devo."

Mi traktis laŭ tiu ordono. La demonstrantoj estis trankvilaj. Ankoraŭ sur "Kalimegdan" k-do Tucoviĉ alvokis la amason trankvile disiri hejmen, kiel decas al konsciencaj studentoj kaj laboristoj.

Mi ektimis, ĉu mi povos plenumi mian taskon. Miaj poŝoj estis plenaj da ŝtonoj. Kiam la granda amaso, kiu konstante kreskis, volis preterpasi la "kortegon" (reĝa palaco), la strato estis barita de ĝendarmoj, por malebligi preteriron. La amaso komencis sub la premo de la ĝendarmoj ŝanceliĝi kaj reiri. Kiam ĝi reiris ducent da paŝoj, mi ekkaptis la okazon kaj ĵetis ŝtonon en la fenestregon de la redakcio "Male Novine". Por la amaso efikis mia faro kiel signalo.

Tuj alflugis pluvego da ŝtonoj. Kelkaj demonstrantoj eniris la redakcion kaj elĵetis la meblaron. De ĉi tie la amaso direktiĝis al ĉiuj registaraj gazetoj kaj faris la samon. La polico ŝanceliĝis. Rapide alvenis la ĝendarmaro kaj soldataro. Ĉe la eniro al "Kalimegdan" la studentoj kaj laboristoj konstruis barojn el verdaj benkoj. Malantaŭ la baroj, ili per ŝtonpluvoj celis la ĝendarmaron, tuj kiam ĝi provis ilin forpeli el iliaj pozicioj.

Tiam venis ordono, ke la kavalerio ekagu. Sed tuj kiam ĝi estis farinta unu paŝon, la demonstrantoj kriis unuvoĉe: Vivu la soldataro! kaj la soldataro ekstaris kiel enterigita. Tio estis tuj sciigita al la "kortego". El la "kortego" venis la ordono ke ĝendarmaro, ĉiam sindonema al la "kortego" kaj registaro, pafu en la ribelaron.

Ekkomencis sovaĝa batalo. La ĝendarmaro disvolviĝis kiel en la milito. Studentoj kaj laboristoj batalis kiel leonoj. Ili falis mortigitaj kaj vundigitaj, sed ĉiu klopodis, laŭforte dispecigi la kraniojn de la malamata ĝendarmaro. En niaj (policaj) vicoj oni diris, estis pli ol dudek mortigitaj kaj dufoje tiom vunditaj, kaj en la vicoj de la studentoj kaj laboristoj, pli ol sepdek estas mortigitaj.

Venis nova registaro kaj novaj homoj.

Mi estis eksigita el la ofico kaj fariĝis komercisto. Sed tiu sekretario, kiu tiel fidele servis al la malnova registaro, sukcesis eĉ en la novaj cirkonstancoj kaj fariĝis ministro.

Hodiaŭ post 23 jaroj mi pentas, ĉar mi estas eĉ nekonscience kulpa, ke tiuj ĉagrenaj junuloj, kies ombroj min akompanis dum mia tuta vivo, pereigis siajn vivojn pro la volo de unu sangavida registaro kaj ankoraŭ pli sangavida „kortego".

Mallongigite trad. el serba jurn. "NOVOSTI"

Vekiĝemulo.

SAT. Tion estas pli malfacile diri pri "Der Arbeiter-Esperantist" de GLEA, "Sv. Arbetar-Esperantisten" de SLEA kaj "La Socialisto" de ALLE!

1. Ili ne propagandas sisteme por SAT, kvankam en ĉiu n-o SAT devas esti aludita aŭ reklamita per la presigo de artikoloj pri celoj, taskoj, utilo kaj praktika laboro de SAT. Do la legantoj ne scias, ke SAT-aniĝi, labori per kaj por SAT estas ilia devo!

2. Ĉiuj tri gazetoj konstante, seninterrompe, sisteme presas esp.-lingvajn artikolojn, kiuj taŭgas, kompreneble, pli ol ĉio por la eksterlandaj legantoj, do devas aperi en "Senn." aŭ "S. R.".

3. Ĉiuj tri organoj nesufiĉe *nun* batalas kontraŭ la neŭtralista atako al la Esp.-laboristoj; tial multegaj Esp.-socialistoj hontinde misuzas tempon kaj monon por kunlabori al UEA ktp.

— SAT-anoj el koncernaj landoj! Ĉu vi intencas, ke viaj presorganoj nacilingvaj utilu por SAT?

Do faru jenon:

1. Postulu, ke la presorganoj konstante popularigu SAT, rakontu pri ĝiaj taskoj, laboroj kaj sukcesoj!

2. Postulu, ke la presorganoj estu nur porvarbaj aŭ porinstruaj! La esp-lingvaj artikoloj, presataj por la ekster-naciaj legantoj, aperu en "Senn." aŭ "S. R.". En la asociorganoj oni presu Esperante nur tion, kio utilas ekskluzive al la koncerna lingvanaro!

3. Viaj presorganoj kontraŭbatalu la mielparolan neŭtralismon sub ĉiuj formoj! Ni ĝojas, kiam neŭtralistoj sukcesas inter nerevoluciuloj, sed inter socialistoj devas prosperi nur SAT! Viaj presorganoj aperigu nacilingve (per kelkaj sinsekvaj n-oj) "For la Neŭtralismon!" —

4. SAT-anoj el Aŭstrio! Ĉu vi fariĝis naciemuloj? Kial vi toleras ekziston de superflua organizaĵo esperanta-laborista sur la germanlingva teritorio Aŭstrio? Kial vi toleras, ke estu du paralelaj organoj? — Maldece! Korektigu ĉi-eraron! Unuiĝu! Por *unu* lingvoteritorio estu *unu* organizo, unu presorgano!

Jen la konsiloj de *Dneprano*



VIa SAT-KONGRESO
EN LENINGRAD
5.—10. Aŭgusto 1926

5. KOMUNIKO

KONGRES-KOMITATO

Gek-doj: *Koĉkin, Lisicin, Podkaminer, Semjonova, Urban.*

KORESPONDADRESO:

K-do S. Podkaminer, Petropavlovskaja 4, kv. 34, Leningrad — Sovetio.

KOTIZO: Egala al la jara SAT-kotizo.

ALIĜILOJ

Skribu la nomon, antaŭnomon, adreson, profesion, partitendencon, n-o de SAT-matrikulo, aktiva aŭ pasiva, membrecon.

Kongresejo: Palaco de Laboro, sidejo de Leningrada Intersindikata Konsilantaro.

Akceptejo: Klubo je nomo de Komintern. Prospekto de 25. Okt., 41—43, angulo de la kajo de Fontanka.

Gek-doj alveturontoj, atentu: En ĉiu stacidomo kaj ŝipalbordiĝejo, de kie oni atendos la alvenon de kongresontoj estas aranĝitaj specialaj dejorejoj-renkontejoj.

Alveturontoj atentu la plakatojn sur la stacidommuroj, montrantajn la dejorejon.

Fakkunsidoj: Ĝis nun anoncis ṣin la gek-doj por sekvantaj fakkunsidoj: 1. fervojista, 2. instruista, 3. ateista, 4. vegetara, 5. kooperativa, 6. junulara, 7. laboristkoresponda, 8. radia. Enskribiĝo por ĉi sekcioj estos daŭrigata dum la kongreso.

Vizoj: Estas promesitaj de Popola Komisario por eksterlandaj aferoj la senpagaj vizoj. Dum plej proksima tempo estos senditaj al ĉiuj aliĝintoj alilandanaj la kongreskartoj, kiuj estos vizataj de sovetiaj konsulejoj.

Veturo: Ĉi fakon vidu en antaŭa n-o sub Karavanoj al Leningrado.

Kongresaranĝoj: Estas interkonsentite kun diversaj sindikatoj pri ekskursoj senpagaj. En la fabrikoj kaj entreprenoj estos aranĝitaj internaciaj mitingoj, kiujn partoprenos diverslandaj gek-doj.

Estos organizata kino-fotografado de la kongreso, ekspozicio de murgazetoj de laboristaj kluboj kaj konkurso de Esp.-murgazetoj — do ĉiuj Esp.-organizaĵoj, posedantaj murgazetojn, estas tre petataj sendi ilin per poŝto aŭ per delegitoj al ni. Post la kongreso ili estos danke redonotaj.

Ni esperas ricevi la senpagan veturon al Moskvo por tuta kongresanaro.

Propono I

a) Enmeti en la Statuton de SAT.

1. En ĉiu loko, kie ekzistas pli ol 2 gesatanoj, ili laŭeble organizas SAT-grupon, kies taskoj estas: organizita plenumado de SAT-servoj, sennacieca memedukado, varbado al SAT ktp.

2. En ĉiu loko, kie ekzistas SAT-grupo, aniĝo al SAT povas okazi nur pere de ĉi-SAT-grupo. (Konsekvence el tio estu nuligata la jena frazo de l' nuna statuto: "En lokoj, kie troviĝas aro de SAT-anoj, personoj povas aniĝi al SAT nur pere de la loka peranto.")

3. Ĉiu SAT-grupo elektas sian peranton kaj sekretarion.

b) Por plifaciligi interrilatojn inter SAT-anoj-gejunuloj diverslandaj, en ĉiu loko, kie troviĝas SAT-anoj-gejunuloj, unu el ili estu elektita kiel "junular-peranto" kaj notita en la adresaro de la SAT-jarlibro per la literoj "J. P.".

Propono II

a) La Sennacieca Konsilantaro de SAT estu elektata por 2 jaroj.

b) La ĝenerala voĉdonado devas esti komencita ne pli ol duon-monaton post la finiĝo de l' kongreso kaj finita ne pli ol 2 monatojn post la kongreso.

c) La voĉdonado devas esti klare plenumata. Ĉiu *aparta* demando devas esti *aparte* traktata.

d) La Eldon-Kooperativo estu aŭtonomia organizaĵo ĉe SAT kun speciala kapitalo kaj havaĵo.

e) La redaktantaro de "Senn." estu komisiita morale gvidi la informservon de SAT, ĉiuj anoj de SAT havu la devon organizi en ĉiu loko oficejon por peresperantaj korespondado kaj informado.

Rimarko: Tiu ĉi lasta punkto povas esti akceptita en la gvida aŭ unu el dezir-esprimaj rezoluciaj de l' kongreso.

Izgur (2332)

— La aliaj subskriboj estas nelegeblaj, jen la SAT-matrikuloj — *1122, 1447, 4520, 3870, 5450.*

3. listo de aliĝintoj al la VI. SAT-kongreso

72.	K-do	Kirjuŝin, P., Minsk . . .	4424
73.	„	Dalidoviĉ, S., „ . . .	6489
74.	„	Prohorĉik, P., „ . . .	4430
75.	„	Curanov, V., „ . . .	5060
76.	„	Fedorov, I., „ . . .	5199
77.	K-dino	Valentinoviĉ, M., „ . . .	5061
78.	K-do	Reichert, H., „ . . .	4996
79.	„	Pavlovskij, B. „ . . .	7091
80.	K-dino	Maliŝevskaja, A., „ . . .	4354
81.	K-do	Asvesul, „ . . .	——
82.	„	Buĉukas, „ . . .	——
83.	K-do	Matev, X	1433
84.	K-dino	Caray, Liverpool	1170
85.	K-do	Müller, A., Lausa b. Dresden .	4033
86.	„	Bruchholz, A., Lausa b. Dresd.	4036
87.	„	Kolev, K., X	4099
88.	„	Löw, F., Köln	6817
89.	„	Hennig, R, Düsseldorf . . .	4959
90.	„	Treml, R., Sollenau	857
91.	„	Karotam, N., Aalsmeer . . .	5356
92.	„	Zimmermann, W., Ammendorf	2002
93.	K-dino	France, B., Manchester . . .	508
94.	K-do	Ebner, F., Klosterneuburg . .	25
95.	„	Epperlein, K., Altenburg . .	4078
96.	„	Scheithauer, M., Wien . . .	2364
97.	„	Wolf, H., Köln	3082
98.	„	Schröder, M., Dresden . . .	111
99.	„	Cierpka, L., Köln	2175
100.	„	Leser, J., Wien	4282
101.	„	Weirhelt, M., Ammendorf . .	7070
102.	„	Schmitz, T., Düsseldorf . .	6909
103.	„	Breddermann, O., Pfauhausen	2429
104.	„	Riese, K., Leipzig	347
105	K-dino	Gössner, E., Leipzig	4292
106.	K-do	Maiblum, B., Lwow	5236
107.	„	Mailand, C, Cassel	265
108.	„	Deiters, F., „	264
109.	„	Goth, H., Waltersdorf . . .	1225
110.	„	Müller, R., Cassel	6298
111.	„	Purkert, V., Reichenberg . .	6839
112.	„	X. en Y.	6087
113.	„	Kavalianskas, X.	6892
114.	„	Bitzer, R, München	1810
115.	„	Neumann, G., Essen	3743
116.	„	Harmsen, M., Aalsmeer . .	5679
117.	„	Effler, A., Wien	2135
118.	„	Grignard, P., Verviers . . .	1854
119.	„	Hartmann, E., Engelsdorf . .	7014
120.	K-dino	Lehmann, M., Halle	6152
121.	K-do	Elze, O „	5312
122.	„	Berger, P. „	2262
123.	„	Schaaf, F., Wörmlitz	6910
124.	„	Stein, R., Ammendorf . . .	7047
125.	„	Schiepe, O., „	7046
126.	„	Dippmar, R., „	7048
127.	„	Alekseev S., Voskresensk .	——
128.	„	Repjevskij N., Stalingrad . .	4742
129.	„	Frolov, P., Saratov	6423
130.	„	Skrjagin, A. „	1706
131.	„	Albanov, D. „	1188
132.	„	Segal, M., „	127
133.	„	Savostjanov, „	5045
134.	„	Umnjakov, I. „	——
135.	„	Golubev, B., Kuvŝinovo . .	5920
136.	„	Rublev, S., Odessa	3711
137.	„	Danovskij, N., Odessa . . .	5508
138.	„	Sahnoviĉ, B., „ . . .	4543
139.	„	Esjkov, V. Kamenskoje . . .	6354
140.	„	Ĉiĥaĉov, E., „ . . .	——
141.	„	Zarubin, G., Livni	3372
142.	„	Kazimirov, G., Kuznjeck . .	——
143.	„	Eberle, N., Pokrovsk	159
144.	„	Sariĉev, S., Saratov	2150
145.	„	Efimov, F., Omsk	——
146.	„	Donec, N., Staro-Minskaja .	5761
147.	„	Leontenkov, M., N.-Novgorod	3638
148.	„	Kalaŝnikov, V., „	1125
149.	„	Zaĥarov, V. „	6113
150.	„	Piskunov, V., „	5432
151.	K-dino	Polakova, E., „	6806
152.	„	Matjaŝina, V., „	5109
153.	K-do	Vinogradov, S., „	5544
154.	„	Aptek, J., „	5532
155.	„	Beljajev, L., „	4312
156.	„	Burov, K., „	5507

(Daŭrigota en n-o 95)

Presejo: UNS-PRODUKTIV-GENOSSENSCHAFT, LEIPZIG